# KUNLABORA INTERKONSENTO

Inter la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI)
kaj la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF)

La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) kaj la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) en la kadro de la 64a Kongreso de IFEF en Herzberg am Harz (Germanio) traktis pri kunlaboro kaj konsentis pri la jenaj kampoj:

1. Evoluigo de modernaj kursoj de Esperanto por uzo en fervojiistaj rondoj.
2. Organizado de seminarioj por trejnado de instruistoj, ĉefe en la kadro de la IFEF-kongresoj.
3. Kunlaboro terminologia, atentante la bezonojn de la plene faka kaj pli ĝeneraluza terminaroj.
4. Defendado de lingva pluralismo en translimaj fervojistaj kontaktoj.
5. Interŝanĝo de oficialaj revuoj kaj aliaj eldonaĵoj, kaj reciproka aperigo de artikoloj.
6. Invitoj reciprokaj kaj laŭeble partopreno ĉe la aranĝoj de ambaŭ organizaĵoj.
7. Kuraĝigo de kunlaboro inter la landaj sekcioj de ILEI kaj IFEF.
8. Kunlaboro en la kadro de la UEA-komitato por altigi la prestiĝon kaj influon de la aliĝintaj fakaj asocioj.
9. Renkontiĝo inter nomumitaj estraranoj de la du asocioj ĉiujare por resumi la rezultojn kune.

Herzberg am Harz, la Esperanto-urbo, la 25an de majo, 2012

En la nomo de ILEI
S. MacGill
Stefan MacGill
Prezidanto

En la nomo de IFEF
Rodica Todor
Prezidanto
Todor